

HEJES

BULTENO DE

HISPANA ESPERANTO  JUNULARA SEKCIO

Nro. 46

Marto - Aprilo 1966

REDAKTORO: Sro. J. M.^o SERRANO

Merceria, 7, 3.^o - TARRAGONA (Hispanujo)



EL CILINDRO (Pirineo de Huesca)

Grabado cedido por Centro Excursionista Aguila de las Corts

CASAL VILAFRANCA ESPERANTO-GRUPO

Oni okazigas Esperanto-kurson marde kaj vendrede de la 8'30 ĝis la 9'30 vespere.

VILAFRANCA DEL PENEDES havas 14.000 loĝantojn kaj ĝi kuŝas apud la monto Sant Miquel kun eltrovitaj prahistoriaj tomboj. Je 16 kilometroj estas la bela marborda urbo Sitges kaj je la sama distanco oni trovas la industria Vilanova i La Geltru, banita per la Mediteranea maro.

Oni povas admiri en la ĉirkaŭaĵoj de Vilafranca la jenajn vidindaĵojn: Sant Marti Sarroca kun antikva preĝejo romanida kaj vizitinda kastelo de la jaro 1.400. Ankaŭ romanida preĝejo en Moja (Olèrdola) kaj Sant Sebastià dels Gorgs, kaj ravaj monumentoj en Foix kaj Castelvi de la Marca.

Krom la menciitaj mirindaĵoj oni preskaŭ devige devas viziti la Muzeon de la Vino, en la urbo Vilafranca, unika en la mondo; la Katedralon en kies kriptoj ekzistas Llimona skulptaĵo; la monumentojn al la Vino kaj al "Xiquets" (Homaj Turoj),

Ankaŭ plezure ni prezentas kelkajn el niaj membroj kun la propraj okupoj:

SOGAS.—Komerco de ruĝaj kaj blankaj vinoj en karafoj aŭ boteloj en specialaj skatoloj, laŭ deziroj. Str. Duque de la Victoria, 33. T. 70.

Ĉarpentisto TORNER.—Mebloj kaj lingnaĵoj por la domkonstruado. Meĥanika laborado. Str. Ramón Freixas, 34.

Presisto VIVES.—Presejo kun la super-sigmatitaj Esperanto-literoj. Str. Balmes, 8. T. 675.

Restoracio DOMINGO.—Inda pro la servo kaj bongustaj manĝaĵoj. Promejo San Francisco, 13. T. 219.

Filatelisto PLANS.—Interŝanĝo de poŝtmarkoj. A. 1.

Aŭtomobiloj JOSEP PERELLO.—Ekskluziva agente de la aŭtomobiloj CITROEN kun meĥanika servo. Disionisto de la pneŭmatikoj MICHELIN kaj PIRELLI. Str. Calvo Sotelo, 57. T. 463.

ALVOKO

== == == ==

Karaj amikoj abonantoj kaj legantoj:

Estis en nia animo kiam ni prenis la taskon de la Redakcio doni al vi ĉiuj, interesan, amuzan kaj, laŭniaj modestaj eblecoj, altnivelan enhavon. Poste, pripensante la aferon, ni vidis la mal-facilaĵojn kiujn ni sendube trovos tra nia irinda vojo.

Revuo estas kontakto inter la legantoj. Rigardante la enhavon oni povas taksu iomete la legantojn mem; tio estas, iliajn preferojn, kulturon kaj interesojn.

Aliflanke, HEJS-Bulteno estas organo de Junulara Sekcio; tio signifas ke el ĝi devas elpuŝi nova energio kaj nova sento. Ni ĉiuj devas labori por ke tiel estu.

Ekde nun ni jam ĉiutage dankas vian necesan apogon kaj kooperadon. Ne timu, vi (jes, ĝuste vi mem) povas verki artikolon por la proksima numero de nia Bulteno; sendu ĝin rekte al la redakcio. Kion ni vere deziras, estas ke "nia" Bulteno estu vera ligilo kaj interesa.

Same ni akceptas, eĉ atendas, viajn lertajn indikojn por atingi pli altnivelan Bultenon. Ni estas pretaj malfermi skcion "Leteron al la Redakcio" se vi skribas al ni vian opinion, konsenton aŭ mal-konsenton pri iu ajn temo rilate al Esperanto, nia movado aŭ nuntempa junulara temo. Kion ni ne deziras, estas ke HEJS-Bulteno estu preskaumortanta revuo, ĉar Juneco estas Vivo.

La Redaktoro

== == == ==

HEJS-Bulteno

Redaktas: Josep Serrano, Merceria 7 - 3, Tarragona
Dissendas: Hejs -Delegacio, Casanovas 57-6-7 Barcelona

LEGU ... KAJ KONU NIN

Simpatio. Vi sciu, ke ĝenerale la hispano estas simpatia homo. Pli la sudulo ol la nordulo, laŭ la elversituloj. Pli la nordulo ol la sudulo, laŭ la enversituloj. Tio signifas, ke la suda simpatio, pro tio ke ĝi estas pli reĝta kaj pli palorica, trafos vin antaŭ ol la norda, sed estus riske ĝin konsideri pli valora ol la norda. En la sudo vi trovos amikojn pli frue ol en la nordo - la nordanoj estas pli sindetenaj kaj timemaj - sed kiam nordulo manpremos vin, vi havos veran amikojn.

Kompleksoj. Ni povas certigi al vi tute sincere, ke la plej granda parto el ni suferas samtempe du kompleksojn: superecon kaj malsuperecon, sed ne estas necesa ke vi legu la kompletan verkaron de Freud antaŭ ol veni al Hispanio. Eble, preskaŭ al ĉiuj okazas la samo, sed ni diras, ke per influo de la suno ni estas iomete ekstremistaj, kaj ofte trenas la ekscitecon aŭ deprimatecon ĝis gradoj mal multe prudentaj.

Siesto. La siesto estas hispana kustumado kiu lastatempe, ni ne scias ĉu por la bono aŭ por la malbono, saĝnas malaperanta. Preskaŭ neniu jam o siestas jam, kaj tiu kutimo havas pli da partianoj en la landsudo ol en la landnordo, sendube ĉar estas pli necesa en tiu loko kie la meztaga suno varmigas pli. Eble, kun la tempo tiu kutimo ekskluzive farigos eksportaĵo.

Piropo (Bellaŭdo). Ekzistas belaj vortoj - ĝenerale - kiujn la hispana, iuj hispanoj, uzas ankau kiel raŝa specialaĵo, kiam pasas antaŭ ili belaspektaj sinjorinoj aŭ junulinoj: ili estas la "piropo". Ordinare ili estas parola omago - kompreneble, ne petita - de la piediranto al la beleco aŭ gracieco de la preterpasanta virino. Kion vi devas fari en tia okazo - sinjorino aŭ fraulino kiu eble legas nin - estas daŭrigi vian vojon sen iel reagi al la madrigalo de la volontudo. Li ne atendas respondon. Li estas, krom malsanaj esceptoj, seninteresa, pura kaj platona admiranto.

Taŭroludoj. "Neniu tragedio en la mondo interesis min ĝis tio grado. Dum mia restado en Hispanio, mi ĉeestis ĉiujn taŭroludojn". Vortoj de Merimée en "Cosas de España", pri la

nacia festo hispana.

Ni estas certaj, ke vi ĉeestis taŭrbatalon dum via vizito al nia lando. Cetere, vi estus ekstravaganca voĵaganto se vi spitus la atenton de tiu unika spektaklo. Spektaklo? La bonaj emuloj grimacas antaŭ tiu vorto. "Arto", "mito", "rito" ili diras. Vi jam scias: homo batalas kontraŭ taŭron kaj, se io eksterordinara ne okazas-taŭratingo kaj mortigo de la toreadoro-ĝin mortigas. Sed tiun ludon jam oni faris en la prahelena kredo, kaj, malgraŭ tio, taŭrludarto ne ekzistis. La taŭrludo vere estas arto, malfacila kaj senpara arto, arto vere hispana. Komprenoble ne ĉiuj hispanoj estas toreadoroj, sed estas en la sango fortikan hispanan heredaĵon.

Se vi diras al ni, ke la taŭrludo estas kruela, ni ne kuragos tion nei. Ni ankaŭ ne uzos la facilan argumenton kiu diras ke bokso kaj vulpoĉasado estas pli kruelaj. Se vi diras ke la taŭro estas sendefenda, ni konsilos al vi ne vin loki antaŭ ĝia kornaro por tion pruvi. La toreadoro, komprenoble, ludas avantaĝe pro liaj superaj ruzeco kaj inteligento, sed li restas facilvundebla kaj mortigebla; li estas tute sola en la "suerte suprema" (mortiga faro) antaŭ la besto, kaj ne povas mortigi ĝin tiel senĝene kaj nature kiel buĉisto. La toreadoro plenumas ritan programon, plenumas la ludfarojn kun la estetika rigoro de balada dancisto, kvankam tiu frida similaĵo ne taŭgas por komprenigi la dramon necertecon kaj la geniajn kaj neatenditajn sangigojn de la taŭrludado. La matadoro frontas kvalire sian malamikon, ĉe se liaj intencoj estas tragikaj por la besto. La matadoro "mostriskas sian figuron" -hispana eŭfemismo kiu celas mildigi la mortigon-lau artreguloj kaj severa kodo pri kurago kaj honoro. La taŭrbatalo ŝajnas ludo, kaj eble ĝi estas tio. Ne estas io malbona, kaj ordinare estas tiel gaja kiel la suno spegulanta en la brilantaj toreadoraj kostumoj. Sed la dramo povas esti rondiranta. Iu iam demandis al Manolete, antaŭ taŭrludo kial li estis ĉiam tiel gravmiena, kaj la granda toreadoro respondis: "Pli gravmiena estas la taŭro".

(El la broŝuro "Hispanio por Vi", eldonita de la Ministerio de Informado kaj Turismo. Madrid)

oooooooooooooooooooooooooooooooooooo

INVITO AL ANGLUJO

La Loka Kongresa Komitato por la 50-a (juvilea) brita kongreso de Esperanto invitas ĉiuj hispanajn esperantistajn partopreni en la Kongreso en Norwich, la 27-a ĝis la 30-a de majo. Apartaj aranĝoj fariĝos por alilandanoj.

Norwich (prononcata kiel "noriĉ") estas bela urbo, lokita en la orientaparto de Anglujo. Norwich ne estas industria urbo, sed ĝi troviĝas en la centro de grava terkultiva regiono. Tamen, Norwich estas mondfama pro suoj.

La programo por la kongreso estas, pli malpli, kiel la sekvanta; vendredo, la 27-a de majo, la akceptejo malfermiĝos je la 4-a ptm. Je la oka la prezidanto de la L.K.K. parolos dum kelkaj minutoj, kaj la Prezidanto de la Brita Esperanto-Asocio sekvos simile. Tiu ĉi vespero estas ĉefe por interkonatiĝo kaj baĥilado, kaj ankaŭ okazos tradicia angla dancado, kun bufedo por la rigardantoj. Sabate, estos prelego de eminentulo, kiu ankoraŭ estas aranĝota afero. Post lunĉo, okazos fakaj kunvenoj, komentanta periodo kaj prelegoj, kun filmo en Esperanto (ni esperas). La 7,30 ptm fariĝos civita akcepto en la kastelo-muzeo, kun poste, malnovtempa balo. Dimanĉe okazos fakaj kunvenoj de la Brita Asocio kaj la tradicia kongres-sa lunĉo. Sekvos prelegoj de eminentuloj, distraĵoj kaj vizito al la urbo mem. Lunde fariĝos la ekskursoj tra la kamparo kaj por rigardi la vidindaĵojn de la regiono de Norwich. Oni povos ĉeesti la Oficialan Fermiĝon je la deka posttagmeze.

La supre menciitaj estas nur specimeno. La fakto ekzistas, ke eksterlandanoj ĉiam estas sendubo, tre feliĉaj ĉe naciaj kunvenoj de esperantistoj. Por pli da informo skribu tuj al nia sekretariino. Ne gravas, se vi estas komencanto kiam vi foriras de la 50-a Brita Kongreso, vi estos pli sperta.

Ni estos ĉiam je via servo antaŭ kaj dum la Kongreso

La adreso de la Sekretariino estas;

S=ino E. Watson . 5 Rolleston Close,

NORWICH. NORGON. Anglujo

T E L E G R A M E

II-a Internacia Esperanto Seminario

Torun (Pollando)

Studenta Scienca Rondo de Esperantistoj en Torun organizos en tiu urbo dum la tagoj 13-17 IV 1966 la II-an Internacian Esperanto-Seminaron. La tre interesa kaj altnivela programo enhavas konkurson por la premio de la Universitata Konsilantaro de Unuiĝo de Polaj Studentoj sub la temo " Esperanto en Sciencoj ".

Publika leterco de la hungaraj olimpiaj ĉampionoj kaj sportoj al la Olimpia komitato en laŭsanne (Svisujo).

Ĝin subskribis internacia konataj, aktivaj hungaraj sportistoj kaj la gvidantoj de kelkaj gravaj sportkluboj je la nomo de kelkmil sportistoj, kiuj turniĝas al la Internacia Olimpia Komitato per la peto "ili akcelu, ke dum la internaciaj sportaj renkontiĝoj la ĉiam pli populariganta Esperanta lingvo estu akceptata kaj uzata kiel interkonsentita, oficiala lingvo.

Internacia Turista Asocio Oficialigas Esperanton

La Turista Asocio la Naturemikoj, decidis pri novaj statutoj. La artikolo 6^a .d tekstas: " progresigo kaj apogo de la strebado al internacia lingvo, ekz. Esperanto "

Pekino distribuas filmon en Esperanto

La Centra Fareljo de Novajaj kaj Dokumentaj filmoj ĵus produktis, en kunlaboro kun Ĉina Esperanto-Ligo, kolorfilmon en esperanto kun la titolo "Brila Festotago". Tenas pri dokumenta filmo 1450 metra kaj la prezentado daŭras ĉirkaŭ unu horon.

Pli da Kristanaj diservoj en Esperanto

Manchester. Ĉi tie ĵus konencigis regula ĉiumonata Protestanta Diservo en la Internacia Lingvo Esperanto. Jam longa tradicion havas simila Di-servo en Londono.

RONDA TABLO KUN KIERKEGAARD

6

Ni ekkomencas nun akcepti a siajn verojn kaj liajn transcendojn. Disigas nin tabla blankardo; li antaŭ ni. Parolante pri li, diris Magnussen: "La plej granda de Dannlando, kaj unu el la plej grandaj de la Universala Historio".

- Kiel vi nomiĝas ? -Sören Kierkegaard.
-ĉu via nacieco? -Dana, nur en la somato. Mia spirito estas patologia kazo en la historio de mia popolo.
- Kiu estas via koncepto de l' mondo? -Montras geedziĝo inter la perfektigo de teknikmekanikaj medioj kaj grandega konfuzo en la celoj.
-ĉu via religio ? -Mi estas persono vizaĝ al Dio. Kuniĝita al li pere de la suferado.
- Kiel vi difinus vi mem ? -Kiel izolita abio, egoisme fermita interne ni mem, kiu nur kreskas al la alteco kaj kiu leviĝas sendonante ombron kaj nur turko nestas en niaj branĉoj
- Kiel vi povis rompi vian ligilon kun la aliaj ? --ĉiam mi estis konvinkita ke neniu ricevus helpon aŭ konsolon.
-ĉu vi kredas en la libereco? -Mi kredas en "ia" libereco, ĉiu devas respondi pri sia propra destino. Dio estas senkulpa.
- Mi volas scii la kialon de via stoika pozicio antaŭ la sufero. -- Dio parolis al mi: Vivu la homan ekzistadon kun tiu strebo kiu neniu, krom vi, ĝis nun konis. La duono sufiĉas por savi la mondon. Malgraŭ tio, vi devas akcepti ĉiujn malkomprenojn. La reakcioj kiuj provokos via konduko servos al la aliaj por ke ili malrapide leviĝu kaj atingu kion ili devas esti.

- Kaj, ĉu vi estas konvinkita de via eNe forgesu tion de Goethe; "kiu deziras fari ion transcenda en la mondo, devas agi for de ĝi".
- Kio estas via vivo? -Grandega aventuro. Esti sola kun Dio.
- Kaj fininte ĵan Sören, kion vi konsilus al ĉi tiu mondo?
- Nenion: ĉiu homo estas mondo: ĉiuj ricevis de la naturo sian determinatan ujon kaj mezuron.

-o-o-o-o-o-o-o-o-

Sören Kierkegaard, homo bezona kaj sincera. Izolulo kiu skribis; Ni ŝatus, post la satisfakcio lasi ĉion, paroli frendan lingvon por aspekti frenda al ni mem".

Homo kiu batalis por la atingo de ekvilibro kiun neniam ĝuis. Homo kiu difinid:.. "Kio estas feliĉo? Spektro kiu ekzistas post esti estinta. -Kaj la espero? Maloportuna entrudulo kies ni ne povas sinkaŝi; lerta trompisto pli daŭra ol la honesteco, batalena aniko kiu ne volas perdi siajn rajtojn kvankam Cezaro estu perdinta la proprajn.

Kaj la rememoro? Ĝena konsolo, perfido kiu vindas nin dorsflanke, fantono tute malfacile vendebla kvankam oni trovu acetanton.

Kio estas beateco? Aŭguro kiun oni lasas por tiu kiu ĝin kolektas.

Kaj fido? Ŝnuro kies ni pendas, escepte se oni servigas ĝin por sin mortpendigi.

Kio estas vero? Sekreto kiun la mortantoj forprenas kun si

Kaj anikeco? alia turnento pli, kaj atendo? Flugema sago fiksita en pafarko.

Ili homo kiu renis tra la maroj de l'angoroj; viktimo de sia sperto. Bedaŭrinde, en multaj intelektaj medioj Sören Kierkegaard estis lokita nur kiel simpla elemento de observado.

Antonio Infante

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Deziras interŝanĝi poŝtnarkojn, sperta filatelisto: Antonio Dovbiš

SOSTKA Sumskoj obl.

Korolenko 43-3 Ukrainio. USSR

~~~~~

HONORE ALDRO. L. L. ZAMENHOF

LA GRANDA KAJ GRAVA TRANSCENDO DE ESPERANTO

Okaze de la 49<sup>a</sup> jara datreveno de lia forpaso en Varsovio, estu al mi permesata dediĉi mian artikoleton al la membroj de H.E.J.S., sed tre speciale al la junulara familio, estonta fundamento de nia movado kiu bezonas renovigi per la akcepto de novaj esperantaj valoroj kaj esperantist-konceptoj pri la farenda kaj farota agado favore al enkonduko de l'inter-nacia lingvo, kies imponan transcendon ankoraŭ multaj ne sufiĉe bone taksis pro diversaj cirkonstancoj kaj miskomprenoj, kiuj videbliĝas en la fono de niaj atingajppj certe multaj kaj konvinkigaj.

Malgraŭ tio ke Esperanto jam superis la tradiciajn malfacilaĵojn nome: nescio, lingva jaluzeco kaj politika etiketo malprave aplikita al nia idiomo, restas bedaŭrinde troaj pezaj kreitaj intereso kiuj forte bremsas la impulson de niaj deziroj kaj idealoj celantaj al universala reciproka interkomprenado en la mondo, kies bonon kaj necesan feliĉon oni persekutas kun sankta obstineco, sed kelkafoje ne uzante la plej taŭgajn rimedojn kaj metodojn por ke nia fosita sulko estu profunda kaj la propra rikoltado kontentiga kaj abunda.

Iufoje, ni fidas tute al servoj kaj helpoj kaj fortoj de l' eminentaj samideanoj kies klereco kaj rekta influado sur la medioj en kiuj ili vivas kredigas nin ke la afero prosperos kaj finfine sukcesos, Krom tio, multaj esperantistoj, kun granda bona volo kaj natura naiveco opinias ke nurla oficialigo de l' Esperanto estos la definitiva jah kaj nura solvo de la lingva problemo. Grava eraro ĉar tiu babela fantono de l' homaro postulis kaj postulos ankoraŭ de ni, titajn niajn energiojn, klopodojn kaj oferojn, se ni volas venki.

Nu; por eviti eblan konfuzon estas necese rimarkigi ion; Esperanto ne bezonas venki, ĝi jam venkis de sis naskigo, Ekde tiam, la divastigo de nia lingvo estas tiel granda ke ĝi aperas kvazaŭ vera miraklo, se oni ĝuste pri kalkulas la atingitajn rezultatojn sur la kampoj de la scienco kultu-

la lingvo en pluraj kaj diversaj medioj, kaj tute alia, ĝia ĝenerala kaj masiva enkonduko en la mondo.

Pri la bondeziroj ni ne forgesu la populara proverbo: "Per bondeziroj kaj promesoj estas pavimita la infero". Plie oni ne esperu ĉion de la altaj instacoj aŭ registaroj, kiel sinceraj kaj dezirplenaj ili estu, ĉar ankaŭ estas vero ke la registaro ĉiam estis tiel okupitaj pro ĉiuspecaj problemoj rasaj, seksaj kaj aliaj neatenditaj okazintaĵoj, ke ili verdire ne povas sin dediĉi al nia specifa lingva problemo kiun, preterpase estu dirite, ili eble juĝas kaj konsideras ankoraŭ ne matura.

La solvon ni serĉu en alia direkto, t. s. en ni mem, en la forto de niaj konvinkoj kaj en tio kio estas pli grava; en nia klara konscio pri la grava transcendo de Esperanto; nur tiel ni povos "dissalti la Obstinajn barojn" kaj konsekvence enradikigi Esperanton en la socia vivo.

Sed por atingi tion nepre urgas ke ĉiu esperantisto akiru la necesan lingvokonon por tiamaniere instrui la internacian interkomunikilon en sia familio, metio aŭ profesio, kun la celo pligrandigi iom post iom la nombron de samlingvanoj pretaj forte bataladi por efektiviĝi niajn karajn idealojn; ke aŭ ĉiuj okupoj, postenoj kaj laboroj ekzistu kapablaj samideanoj agante kiel laboremaj abeloj por klare konstati la taŭgecon de Esperanto por interrilati kaj alproksimigi la popolojn; ke dum niaj internaciaj vojaĝoj ni renkontu en la fervojoj, agentejoj, kontoroj, hoteloj, preĝejoj, k. s., esperantistoj al kiuj oni povu sin turni kun la agrabla espero esti bone komprenataj en kia ajn demando, peto, servo aŭ turidma aŭ laborecaj necesoj.

Tiaj menciitaj agrablaĵoj dependos de ni ĉiuj, kondiĉe ke ni konvene kaj efike plenumu nian taskon, Tial, rilate ĉi tiun aspekton. D-ro Ramon Menendez Pidal, Prezidanto de la Rega Akademio pri la Hispana Lingvo, antaŭ nelonge rekomendis la jenon:

"NI ĈIUJ KLOPODU POR KE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO  
NATURIĜU LAŬ LA DEJ AJTA KAJ ERJA MEZIRO "

Saĝaj kaj pravplenaj vortoj kiuj montras ke Esperanto meritas esti konsiderata kiel ajn lingvo nacia kaj kun la samaj devoj kaj rajtoj ol la plej divastigitaj idiomoj en la mondo, por kies bono kaj feliĉo tion laboradis kaj suferadis.....

VIVO EN LA ESPERANTISTA KASTELO DE GRESILLON

Nia kara profesoro, karaĝ gesamideanoj: Hodiaŭ mia celo estas rakonti alvi la belajn tagojn pasintaĝ en nia Esperantista Kastelo de Gresillon

Dank al nia kara D-ro. Zamenhof ni havas nun internacian lingvon, internaciajn kongresojn, la saman idealon inter la samideanoj kaj multajn gravajn kunlaborojn por montri al la homaro ke la paco kaj la harmonio inter la popoloj estas ankoraŭ eblaj. Tiu ĉi somero mi vidis demonstracion de tiuj gravaj kunlaboroj de la esperantistaro: La Esperantista Kulturdomo de Gresillon.

Gresillon estas je du Km. de Baugé, inter la riveroj "Maine" kaj "Loire" en la tre konata regiono de la kasteloj de la Loire. Do, estas en la centro de Francujo, ionete maldektre. En la du km. inter Baugé kaj Gresillon, oni jam povas sufiĉe admiri la belan pejzaĝon, la verdajn herbejon, la mirindan naturon.

Mi deziras ke vi nun, per via imago, akompanus al mi tra la vivo en la Kastelo. Kiam mi alvenis tien, la sekretariino kaj la aliaj ĉeestantoj salutis min kore, kaj montris al mi mian ĉambbron. Oni instalas siajn pakajojn en dormoĉambro kaj oni povas observi; modernan liton, lavmeblo kun fluanta akvo antaŭ spegulo, meze de la ĉambro aŭ kontraŭ la muro, tableto kun seĝo aŭ foteto, kaj fine, sranko estas por ricevi la tolaĝojn de la vizitantojn.

Mia unua impresio kiam mi alvenis tie, estis trovi la kulturdomo kiel granda mezepoka kastelo, izolita de la mondo kaj de la civilizacio. Por helpi mia unua impresio, granda sonorilo estis la utilaĝo por alvoki la ĉeestantoj, poste la grandaj galerioj, la granda ligna ŝtuparo, ĉio kondukis min pensi tion. Kiam oni malsupreniris la ŝtuparon, oni trovas maldektre la maĝoĉambbron kun grandaj fenestroj, longaj tabloj kaj seĝoj.

La mangoj tie okazas en tute familia etoso; mi povas diri al vi ke en mia tablo estis: du samideanoj de Francujo, tri el Germanujo, unu el Aŭstrujo, unu el Svislando kaj mi Hispana; kiel vi povas vidi. ĝi estis vere internacia tablo.

oooooooooooooooooooooooooooo

11  
Dekstre, la granda salona kun tabloj kaj foteloj. Tie oni povas kartludi, aŭdi muzikon, legi librojn, ludi la pianon kaj ciam tie ekzistas agrabla etoso. En la apuda ĉambro; troviĝas la biblioteko kaj la koridoro vidante la ĝardeno, tablotenizo. Kiam mi vidis tion, mi jam ne pensis ke mi loĝis en mezepoka kastelo sed en moderna kulturdomo.

La vespero de mia alveno, post vespermanĝi, en la salono okazis la kutima interkonato, dum kiu, ĉiuj la samideanoj ekkonis nin. Tiu amikeca kunveno donas rapide konfidon kaj oni komprenas bone la familieco de la etoso.

En la sekvantaj tagoj oni povas sekvi la horaron de la kastelo aŭ dormi, legi, promeni, k. t. p. ciam kun libereco. Tie ĉi la kursoj de Esperanto estas dividataj en tri gradoj, tiel, oni povas lerti la gradon kiun pli konvenas. Post la vespermanĝo, ĉiuj la cesejntoj ĝenerale iris al la salono por ludi aŭ aŭskulti paroladon en Esperanto. Oft e ankaŭ oni prezentis al ni lumbildojn el la diversaj regionoj de Francujo. Ankaŭ oni montris el ni la esperantan filmon "Angoroj". Alia vespero parolis hungara samideano, kiu bone parolis pri Hungario, montrante dispozitivojn pri la ĉefurbo Budapeŝto, kie okazos la venonta Universala Esperanta Kongreso. Alia tago, germana familio amuzis nin kun germanaj poemoj kaj kun germanaj kanzonoj kiujn ili mem ludis per piano. Kiel vi povas konstati ni ne povas havi tempon por enuigi nin.

Oni faris dum la dimanĉoj belajn ekskursojn. Mi partoprenis la ekskurson tra la kasteloj de la Loire. Ni iris apud la bordo de la Loire ĝis Saumur, kie oni povas vidi belan kastelon levita sur la pli alta parto de la urbo. Ni trapasis Tours, poste la kastelo de Chinon lumo inter la regionoj de la Toureene kaj Anjou kie oni diras ke Juana de Arco iris por rakonti al la reĝo de Francujo sian vizion kaj mision de batali kontraŭ la angloj. Poste ni vizitis la renesanca kastelon de Azay le Rideau, kaj de Langeais eble la plej bela en la internajo, pro la mirindaj pentraĵoj kaj tapiŝoj.

Kaj okazis ke kiam mi estis pli felica... jam la du

semajnoj forpasis kaj mi jam devis foriri.

Mi volus rekomendi al vi ĉiuj kiuj dezirus pasigi belajn tagojn por ripozi, por amazi, por paroli Esperanton, por fari geamigojn vojaĝu al Gresillono.

Gresillono oferdonas al ni ne nur plulerni kaj praktiki la internacian lingvon Esperanto sed ankaŭ aŭdi kulturnajn prelegojn, studi specialajn problemojn, ekkoni novajn geamigojn, kaj kiel mi diris en la komenco, montri al la Homaro ke la vortoj de nia himno -La Espero- estas tute pravaj:

" Sur neutrala lingva fundamento  
kompreneble unu la alian,  
la popoloj faros en konsento  
unu grandan rondan familian" .

Rafaela Urueña

" La granda kaj grava transcendo ... "

disdumvive D-ro. Zamenhof, unu el la plej bonfarantoj de l'homaro.

Pfiro . Jaime Aragay Pujols.  
(Fakdelegito por Instruado en Barcelono).

& & & & & & & & & & & &

2ª Edición del

VOCABULARIO ESPAÑOL-ESPERANTO  
del Dr. E. Tudela Flores

Aparecerá en Abril próximo, en un tomo encuadernado de más de 500 páginas, puesto al día, formato bolsillo.

Precio: 185 pts.

Encargos al autor:

Str. Ruzafa 41 - Valencia - 6 (Hispania)

Socios manden las cotizaciones al cajero :

Sr. José Sanz Baró C/ . Madrid 163 3 º 3ª Barcelona 14

Lignaĵoj CANET.—Por la servo de la konstruado. Str. Cort. 41. T. 306.

Apotekisto L. M.<sup>a</sup> HERNANDEZ IZAL. en Sant Pau d'Ordal. = Je la servo de la bona sano en la regiono. A. 83 (Vilafranca del Penedès). T. 13.

Filatelisto BOLET.—Interŝanĝo de poŝtmarkoj. Placo Juan Alvarez. 35. T. 156. A. 14.

Presisto YSART.—Konstruado de skatoloj el kartono. Str. Oviedo, 5. T. 333.

Mebloj FELIU.—Sortimento por oficejoj, geedziĝoj kaj ĝeneralaj ornamaĵoj. Str. José Antonio, 19. T. 543.

Trinkejo SPORT.—Kafoj kaj malvarmtrinkaĵoj. Promenejo Nuestra Señora, 49. T. 718.

Vinagroj DURAN.—Aromigitaj el herboj, ellaborado el pura vino Str. Comercio, 36. T. 11.

GRAU.—Amatora fotografisto. Str. Benach, 4. T. 865.

ĈAMPANO, RAVENTOS CATASUS.—Aŭtentika kelo. Oni provizas kun etiketoj en Esperanto. Str. San Pedro, 8. T. 108.

Aŭtomobiloj SAN JOR (Renta-Car).—Taksimetroj. Luo sen ŝofero. Str. Amalia, 24. T. 580. J. Sogas Muntané.

SEGUI MÜLLER.—Advokato Filatelisto. Str. G. Cortijo, 22. T. 523.

CASAS.—Ferajvendejo-Kristaloj-Vitroj-kaj materialoj por la konstruado. Str. Ferrers, 3. T. 42.

GIRALT.—Pentristo de aŭtomobiloj. Av. Tarragona, 40. T. 459. - Kaj Str. Amalia, 85. T. 385.

SANS Bicikloj kaj motorcikloj. — Ĉiuj specoj por geinfanoj kaj plenkreskuloj. La eksterordinara motorciklo OSSA, la plej moderna por sportadi Modernaj TURNILOJ por la konstruado de industriaĵoj aferoj, laŭ deziro Str. Tarragona, 16. A. 118. T. 458.





# MADERAS CALLAU



Sans. 302 - Teléf. 239 05 24  
BARCELONA (14)

# jovani

instalación  
restauración  
reparación

juegos electrónicos, futbolines, billares,  
billarines, etc.

instalación sin  
ningún gasto para  
el cliente

PJE. PUJÓS, 19 - TEL. 205 11 83  
HOSPITALET - BARCELONA

# ZURCIDORA

y

# TEJEDORA

ROSITA GALBANY

Sans, 292, bajos  
Teléf. 230 29 41  
BARCELONA

# VENDO RETALES

*para falda o pantalón  
directos de fábrica*

## *J. Cardellach*



C. Salvatierra, 99  
TARRASA